# Esperanto en Danio

21-a jarkolekto • n-ro 2 • majo 2014



**Esperanto en Danio**
membroorgano de
Dana Esperanto-Asocio

ISSN 0909-6124

**Adreso de la asocio/prezidanto:**
Ileana Schrøder
Vestavej 4, 2770 Kastrup
☎ 32 51 31 16 dea@esperanto.dk
Ĝirokonto: 1551-805 7370
UEA-kodo: deaa-t

**Kromaj estraranoj:**
Arne Casper Mortensen (kasisto)
Finn Østerbæk (vicprezidanto)
Jens S. Larsen (sekretario)
Bent Jensenius
Peter Wraae

**Redakcia adreso:**
Jens S. Larsen
c/o Trillingsgård, Munkebjergvej 77
2770 Kastrup
☎ 52 64 44 72 eed@esperanto.dk

**Presado:**
DDFO

**Adresŝanĝoj al:**
La prezidantino (adreso supre)

Represo de artikoloj el EeD estas permesata kun indiko de la fonto.

Limdato por la venonta numero:

**15.08.2014**

# Enhavo

**Enkonduke................................3**
**La jarkunveno 2014.................4**
**Jarraporto de DEA por 2013....5**


**Gazeteltondaĵoj......................13**
**Kopenhagaj okazontaĵoj........14**
**En dana Esperantujo troviĝas trezoro...................................15**

**Nova Esperanto – dana vortaro ..................................................17**
**Honorigo al Mogens Rude Andersen................................18**

**Atentu kolektantoj..................19**
**Jubilea kongreso de EEU......20**
**Turista vojaĝo al Bona Espero ..................................................21**

**Mallongaj notoj.......................24**
**Konferenco de ILEI................25**
**Esperanto por abiturienta diplomo..................................26**

# Enkonduke



Antaŭ semajno finiĝis nia 106a jarkunveno kun la partopreno de elstaraj eksterlandaj gastoj kiuj prelegis pri interesaj temoj (vidu la artikolon). La estraranoj pri kiuj oni ĉi-jare balotis, estis reelektitaj, kaj la estraro daŭrigas sian laboron. Tamen ni konstatis ke, konsiderinte la nombro de partoprenatoj, ni eble devos repripensi la organizadon kaj disvolviĝon de la venontaj jarkunvenoj. Pri tio ni diskutis en la ĝenerala kunveno, kaj la estraro daŭre konsideros tiun aspekton kaj decidos. Alia grava temo estas varbado de novaj membroj, kio ankaŭ grave rilatas al partopreno en la jarkunvenoj, kaj al la evoluo de nia dana movado.

Pri la proksimaj taskoj de nia strategia plano ni povas informi, ke en ĉi tiuj tagoj DEA preparas mesaĝon sendotan al la kandidatoj kiuj kandidatiĝas en la elektoj al la Europa Parlamento kun pluraj demandoj pri ilia sinteno al lingva politiko en Eŭropo. Estos interese vidi ĉu kaj kiu el ili respondos pri demandoj por efektivigi la principojn pri egaleco, ne-diskriminacio kaj justeco kadre de la lingvo. La estraro de Eŭropa Esperanto-Unio rekomendis al landaj asocioj sendi mallongan tekston, por certigi sin ke ili legos la mesaĝon.

Dum la somero DEA partoprenos en la grava popola manifestacio "Popola renkontiĝo" en Bornholm kaj la 28-an de aŭgusto en la evento "Smag verden" kiun organizas la Kopenhaga Komunumo. La 1-an de majo Esperanto ankaŭ estis videbla ĉe Fælledparken, kiel ni povas konstati rigardante la bildon en la revuo. Estas ĉiam grave partopreni en tiuj manifestacioj, por esti videblaj al la ekstera mondo, ĉar dum tiuj aranĝoj ni ofte estas konfrontataj kun la repliko: ĉu Esperanto ankoraŭ ekzistas? Tiu pruvon donas la sindonemaj estraranoj kaj unuopaj membroj kiuj helpas nin esti videblaj. Koran dankon al ili! Ĉiuj niaj membroj estas ege bonvenaj apogi nin, partoprenante en la eventoj.

Niaj ceteraj klubaj aktivecoj paŭzos dum la somero, kaj mi deziras ĉiuj niaj membroj bonan someron!

*Ileana Schrøder*

# La jarkunveno 2014

Dum la semajnfino 26-27 de aprilo okazis la 106a jarkunveno de DEA. La jarkunveno komenciĝis sabate postagmeze kun 30 partoprenantoj, kaj la programo havis du elstarajn prelegantojn.

D-ro Ulrich Lins prelegis pri la dana Esperanto-movado tra la okuloj de Gestapo. La prelego estis bazita sur dokumentoj kiuj troviĝas en la Federacia Arkivo en Berlino, kaj koncentriĝis pri la demando kiel la naciaj autoritatoj SS/Gestapo traktis la danan movadon. La prelego tuŝis ankau la evoluon de la movado en kelkaj aliaj eŭropaj landoj dum la milito, komencante per la fakto, ke en 1936 la nazia Germanio likvidis sian Esperanto-movadon, kaj tuŝante komparocele ankaŭ Nederlandon, Francion, Norvegion kaj Hungarion.

La dua prelego kiun Mirejo Grosjean faris, trakrtis la temon: UN, UNESCO: multekostaj establoj au valoraj renkontiĝoj? Mirejo montris bildojn precipe de la sidejo en Genevo kaj rakontis pri siaj spertoj, dum ŝi reprezentis UEA en 2009 kaj 2010 dum kelkaj sesioj kiuj tuŝis la lingvajn homajn rajtojn. Ŝi prezentis la temon inkludante amuzajn anekdotojn kaj montrante belajn fotojn de la imponaj vidindaĵoj en Ĝenevo.La konkludo estis evidenta: estas grave ke UEA partoprenu kaj kontribuu al la laboro de UN kaj UNESCO kaj tre laudindas la kontribuo de niaj volontulaj reprezentantoj. La tago finis per festa bankedo, kaj la sekvan tagon DEA okazigis sian ĉefan jarkunvenon.



*La prezidanto pozas kun la prelegantoj de la jarkunveno*

# Jarraporto de DEA por 2013

La jaro 2013 ne estis tiel plena de agadoj kiel la jaro 2012 kiu estis la jubilea jaro. Tamen ni daŭrigis niajn kutimajn aktivecojn.

Dum la jaro ni partoprenis en diversaj aranĝoj:

En februaro ni kiel kutime partoprenis en la forio Krop-Sind-Ånd en Falkoner Centro kun diveraj informaj materialoj. En junio ni por la unua fojo partoprenis en la "popola renkontiĝo" (Folkemøde) en Bornholm, kie nia membro Jonas Dalmose ĉeestis kadre de la ombrela organizo Fredsministeriet, en kiu DEA estas membro, kaj li sukcese reklamis pri nia lingvo. La programo de la dana radio P4 intervjuis lin pri la lingvo. En aŭgusto ni partoprenis en la foiro "Smag verden" organizita de la Komunumo de Kopenhago, ĉi-foje en Prags Boulevard kie ni havis je dispono budon en trakvila parto de la foiro, kie ni povis informi la interesitojn pri nia movado. Same en aŭgusto ni bonvenigis la polan grupon Sadeszane sub la gvidado de Halina Komar, prezidinto de la pola landa organizo.

DEA estis la kunordiganto de la gastigado inter la dana kaj la pola organizoj. En novembro ni denove partoprenis en la Librofoiro en Bella-Centro.

Bedaŭrinde ni ne sukcesis starigi prelegvesperon la 21an de septembro (la Tagon de Paco) kune kun niaj kunaranĝantoj, ĉar lastmomente la gasto el Turkujo, jurnalistino, kiu akceptis alveni al Kopenhago kaj paroli pri aliaj eblecoj de demokrata agado, decidis ke ŝia partopreno en tia aranĝo estus tro danĝera por ŝia daŭra vivo en Turkio.

DEA ne sukcesis akiri subvencion pri Grundtvig-projekto kunlabore kun aliaj esperantistaj asocioj, sed ni denove ĉi-jare sendis projekton kun peto pri subvencio kaj fine de aprilo ni sendos novan projekton kune kun kelkaj aliaj organizoj.

Kunlabore kun KEK, DEA aranĝis ege sukcesan Zamenhofan feston la 15an de decembro kun partopreno de familioj kun infanoj kaj agrabla muzika postagmezo.

Bedaŭrinde ni konstatas ke la membronombro de nia asocio malkreskas. Eĉ se ankaŭ aliaj asocioj spertas la samon (ankaŭ UEA), ni tamen devas

klopodi plifortigi kaj energie varbi novajn membrojn, kiel ankaŭ la prezidanto de KEK emfazas en sia raporto. Precipe ni devas ĝentile klopodi ke la lernantoj spertu internacian etoson, aliĝante al iu internacia evento, kio estas la plej bona reklamilo por sperti la eblecojn de la movado.

Por pliaktivigi kaj vigligi la movadon, UEA starigis kurson nomita AMO (Seminarioj Pri Aktivula Maturigo). La unua seminario okazis en marto de la 22a ĝis la 24a en Hungario. DEA sponsoris unu el niaj junuloj al tiu seminario, kiu spertis por la unua fojo internacian renkontiĝon. Li venont-monate rakontos en KEK pri ĝi kaj la akiritajn spertojn.

Alia atingo estis la eldono de la bibliografio de la fama dana komponisto Carl Nielsen, kiun sukcese preparis por la eldonado nia agema samideanino Betty Chatterjee

Fine mi dankas miajn kolegojn de la estraro pro ege bona kulaboro dum la pasinta jaro, kaj niajn membrojn kiuj daŭrigante sian membrecon apogas nian laboron!

## Eksteraj rilatoj

Krom esti membro de la reprezenta komitato de la UN-Asocio, kaj membro de K. U. K. S., la ombrela asocio de danaj kaj alilandaj kulturaj asocioj, ni estas membro de NETOP, ombrela organizo de Kleriga Ligo (Oplysningsforbund) kaj de Fredsministeriet, ombrela organizo de asocioj pri paca movado.

## Informado

### Esperanto en Danio

Nia revuo Esperanto en Danio aperis 4-foje dum la jaro 2013. Ni devis bedaŭrinde malaltigi la elsendadon de 5 al 4 fojoj pro la daŭra plialtigo de la sendokostoj. Dum la lastaj 10 jaroj ni ricevis subvencion de ”Bladpulje”, pro la plialtigo de la sendokostoj. Entute de la jaro 2004 ĝis la jaro 2013 ni ricevis subvencion de 27.600 dkr. sed de 2014 la registraro decidis nuligi tiun subvencion. Ŝajnas ke alvenis la tempo decidi pri reta elsendo de nia revuo estonte por tiuj membroj kiuj havas retaliron.

### Fejsbuko

La fejsbuka paĝo “Amikoj de la Dana Esperanto-Asocio” estas vigle prizorgata de Betty Chatterjee.

### Hejmpaĝo

La tekniko de nia hejmpaĝo estas sufiĉe malnova, tial ni komencis la laboron por plimodernigi ĝin.

### Gazetartikoloj

*Raportas J. S. Larsen*

En multaj bibliotekoj oni povas senpage uzi la retpaĝon Infomedia, per kiu oni povas traserĉi ĉiujn danajn periodaĵojn depost 1990 – gazetojn kaj revuojn, tutlandajn kaj lokajn – kaj vidi la tekstojn. Serĉante la jaron 2013 per la vorto “esperanto”, oni ricevas entute 87 artikolojn, el kiuj 16 estas el tutlandaj gazetoj, 43 el regionaj kaj lokaj gazetoj kaj 21 el “retaj fontoj”, plejparte ripetoj de informoj el la gazetoj.

La regionaj gazetoj ĝenerale donas la impreson ke Esperanto estas pasintaĵo (kaj en du revuaj artikoloj Esperanto rolas en infanaĝaj rememoroj). “Sjællandske Næstved” citis artikolon de 1938, laŭ kiu la 30-a dana jarkongreso okazos en la pentekosto kun 175 partoprenantoj el la tuta lando plus nombro da eksterlandaj gastoj. La nombron de region-gazetaj artikoloj altigas ankaŭ la nekrologoj: Dum la jaro mortis la esperantoparolantoj Svend Aage Hvass en Aarhus, Anna Zofie Hansen en Høng, Lilly Laustsen en Nørresundby, Birgit Gårn en Silkeborg kaj Ludvig Hovelsø en Aalborg. Sed esperantistoj povas esti longvivaj: La 29-an de oktobro centjariĝis Børgine Gottschalch en Langå! Rimarkinde estas, ke nur kelkaj el la menciitaj personoj estas konataj al ni kiel membroj.

Inter la tutlandaj gazetoj, la plej oftaj mencioj (5) estis en Jyllands-Posten. Profesoro Bent Jensen menciis en recenzo ke eĉ “eĉ io tiel sendanĝera” kiel la esperantistaj kaj filatelistaj asocioj estis dissolvitaj en orienta Eŭropo dum la komunismo. En alia artikolo Martin Ågerup, direktoro de la pensfabriko “Cepos”, pledis ke la plejbono estas malamiko de la bono, interalie per la argumento ke malmultaj emis lerni Volapukon kaj Esperanton, do eble ili tamen ne estas tiel perfektaj kiel oni asertis. Sed krom tio estis tre pozitiva recenzo de la ekspozicio “Domo de Eŭropa

Historio en Ekzilo" en Bruselo. Tiu ankaŭ estis priparolita en la revuo "Arkitekten", eĉ kiel "la plej bona ekspozicio de 2013". Ambaŭ artikoloj, tamen, estis tradukaĵoj el la Angla.

Plue menciindas ke lokaj gazetoj en Køge kaj Roskilde raportis pri prezentado de la koruso "Verdens Sirener" kiuj kantas ankaŭ en Esperanto, kaj artikolo pri la lernantoj de Tove Bak en JyskeVestkysten Kolding. Ankaŭ estis du artikoloj pri planlingvoj ĝenerale, en Lolland-Falsters Folketidende kaj en la porinfana sekcio de Weekendavisen. Kaj fine en Weekendavisen estas menciita la interesa blogo "Island – a wrote story" de la aŭtorino Hanne Højgaard Viemose, debutinta en 2011 per la favore recenzita "Hannah". En Islando ŝi eklernis Esperanton kaj helpis ĉe la UK.

**Libroservo**

*Raportas Arne Casper*

La librovendado vendas pli-malpli same multe kiel dum la lastaj jaroj, sed estus dezirinde se niaj membroj aĉetus pli da libroj, apogante tiamaniere nian esperantan literaturon. Ni vendas precipe lernolibrojn kaj vortarojn, sed ankau nian novan eldonajhon: la bibliografio de la fama komponisto Carl Nielsen.

**Ĉefdelegita laboro**

*Raportas Arne Casper*

La nombro de individuaj membroj furoris en 2011, verŝajne pro tio ke UK okazis en Kopenhago. Tiam la nombro de individuaj membroj de UEA transpasis la limon de 100 membroj. Poste la membronombro malkreskis kaj stabiliĝis al 80 membroj. Rimarkinde estas ke 10 niaj membroj apogas la laboron UEA aliĝinte al Societo Zamenhof .

**ILEI (instruistoj)**

*Raportas Bent Jensenius*

Dum la jaro 2013 en Kopenhago la ILEI-sekcio organizis instruadon kun 3 instruistoj kaj 3 diversaj niveloj. Aŭtune aliĝis pluraj kursanoj al por-komencanta kurso, sed post kelkaj monatoj multaj rezignis. Ni spertas ofte ke kursanoj rezignas post iom da tempo, kiam vidiĝas ke la baza nivelo de la kursanoj diferencas.

Plej efika maniero motivigi al daŭra lernado estas ke la kursanoj partoprenu en internaciaj aranĝoj kie ili povas sperti la lingvon kaj la interesajn renkontiĝojn. Ankaŭ en Kolding kaj Ålborg pludaŭras kursoj.

La sekcio nombras 16 membrojn.

**DEJO**

Dejo havas bedaŭrinde nur kelkajn membrojn, precipe juna italdevena membro kiu lastatempe vigle aktivas. Ankaŭ lastsomere oni ĉeestis dum la Roskilde Festivalo kun helpantaj junuloj en internacia etoso.

## Jarraportoj de la Kluboj

**KEK – Kopenhago**
*Raportas Peter Wraae*

Dum la jaro KEK organizis plurajn eventojn, depende de la intereso de niaj membroj, kaj de tio kion ili ŝatis diskonigi. La aktivecoj pritraktis jenajn temojn:

Vojaĝprelego
Prelego pri kongresoj
Diversspecaj ekskursoj
Vesperoj kie oni pritraktis novelojn
Ludovesperoj
Prelegoj precipe por komencantoj.

Kune kun DEA ni organizis Zamenhofan feston kun gastoj el Svedio.

La informoj pri niaj aktivecoj okazis pere de la reto kaj Ponto, liu aperas ĉiun trian monaton. Ĉiusemajne ni sendas informojn pri la venonta lunda kunveno. La membronombro bedaŭrinde falas, precipe ĉar niaj pli maljunaj membroj forpasas. La socia evoluo bedaŭrinde ne favoras al Esperanto, kaj ni ne atingas tiel facile novajn membrojn.

Tio instigas nin esti pli videblaj al la ekstera mondo, por krei pli da intereso pri la lingvo. Pri tio ni laboras ege intense kun DEA, partoprenante ĉe diversaj ekspozicioj, foiroj kaj kulturaj aranĝoj. Ni klopodas renkonti homojn kie ili estas kaj paroli pri la mirinda ideo malantaŭ nia internacia lingvo. La malfacilaĵo varbi novajn membrojn ne igu nin rezigni, sed instigi nin al pacienca laboro.

Mi vojaĝis dum 2 monatoj tra Ĉinio kaj Nepalo, ĉiam pere de Esperanto. En Nepalo tio donis eĥon en la ekstera mondo, verŝajne ĉar mi prelegis pri Danlando kaj ĉiam finis rakontante pri Esperanto. Ni esperu ke tiu etoso estiĝu ankaŭ en nia lando.

Dum mia vojaĝo mi povis rete teni la kontakton kun la Klubo, escepte de periodo en Ĉinio, kie manks reta kontakto. Feliĉe nia estrarano Jens Larsen helpis min.

Fine mi volas danki la estraron por la bona kunlaboro dum la pasinta jaro.

**Århus Esperanto-Klubo**
*Raportas Stanislaw Mielczarek*

La jaro 2013 estis iom pli bona por nia klubo. Nia multjara membro - Nikoline Fiora pro la malbona sanstato malmembriĝis, sed ni ekhavis 4 novajn membrojn. Dank'al privata Esperanto-instruado fare de Erik Kjær membriĝis liaj 2 kursanoj: Benjamin Højvang Jacobsen kaj Benjamin Svejgaard. Ankaŭ Erik Kjær mem membriĝis. Fine de la jaro membriĝis Azhar Shah.

Do, nia klubo havas nun 25 membrojn.

La nova kunvenejo en Folkestedet estas bona. Ni havas kuirejon tuj apud nia ĉambro. En la apuda ĉambro pendas videoprojekciilo. Ni povas do projekcii fotojn, filmojn ks.

En Folkested aktivas multaj asocioj, do foje estas parkumproblemoj. Tial fine de la 2013-a jaro ni decidis, ke nia kunventago en estonteco estu la lasta vendredo de ĉiu monato. Ni esperas, ke tiu tago estos pli konvena.

La partoprenado en la kunvenoj estis sufiĉe bona. Venadis eĉ klubanoj, kiuj loĝas sufiĉe malproksime de Århus. La temoj de la kunvenoj estis diversaj, interalie Henryka kaj Stanisław Mielczarek "prenis" nin en vojaĝon al la belega Kroatio, kiu sendependiĝis en la jaro 1991. Grethe Kvist kaj Erik Hjorth rakontis pri sia tre interesa vojaĝo al Sankt-Peterburgo, Rusio.

La Somera ekskurso 2013 estis ekskurso al lokaj vidindaĵoj en Århus, nome Den Gamle By kaj artmuzeo Aros.

En decembro ni havis Zamenhofan-Kristnaskan feston. Stanisław

Mielczarek konatigis nin kun la vivo kaj sorto de la plej juna filino de Ludwik Zamenhof – Lidia Zamenhof (1904-1942). Per varma vino (ankaŭ senalkohola), pombulkoj, kuketoj, kafo/teo kaj kristnaskaj historieto kaj kantoj ni adiaŭis la jaron 2013.

Dankon al vi ĉiuj por bona kunlaboro en la 2013-a jaro kaj ni esperu, ke la kuranta jaro ankaŭ estos bona!

**Nordjutlanda Esperanto Klubo, Aalborg**
*Raportas Ejnar Hjorth*

En 2013 ni estis 21 membroj, do estas pluso de 1 membro, kompare de la pasinta jaro.

Post la ekspozicio en Aalborghallen, mi ricevis 20 retpoŝtajn adresojn de homoj, kiuj esprimis intereson pri esperanto. Mi skribis al ĉiuj kaj invitis ilin al kurso. Kvar venis kaj jam komencis studi esperanton. Kelkaj aliaj deziras havi informon, kiam ni komencos regulan kurson en la aŭtuno.

La plej grava afero por la kluboj estas informi pri esperanto kaj oferti instruadon. Se ni ne faras tion, la kluboj mortos. Ni jam spertis tion en Danio. Por eviti tion estas bona ideo partopreni en ekspozocioj. Ni ja havis sukceson.

Antaŭ 25 jaroj ne ekzistis esperanto-klubo en Aalborg. Sed pro tio, ke du personoj el la Aarhus-klubo, Stanislaw Mielczarek kaj Wolfgang Kirschstein, tiam faris budon en Aalborghallen, ni komencis studi esperanton kaj ni fondis la Nordjutlandan Esperanto-Klubon. Do, estis tre sukcesa ekspozicio.

La aktiveco de nia klubo estas preskaŭ nur kursoj. Ni havas 3 nivelojn. Entute 12 personoj partoprenas.

La jara kotizo estis la sama kiel en la antaŭa jaro.

La 31-an de decembro 2013 ni havis 11.191 kr en la banko. Ni gajnis ekstran monon pere de tombolo.

La membroj de la estraro estas:

Prezidanto: Ejnar Hjorth
Kasisto: Karen Jørgensen
Sekretario: Else Hjorth
Membroj: Inna Busck kaj Rasmus Jensen
Revizoro: Karen Busck
Anstataŭanto: Annette Holck

# DEAs regnskab 2013

| *Indtægter* | *Kr.* | *Udgifter* | *Kr.* |
|---|---|---|---|
| Kontingent klubber | 9.765 | **Administration** | **11.050** |
| Individuaj | 11.760 | **Gebyrer** | **299** |
| DEJO | 450 | **UEA & EEU konting.** | **1.722** |
| Øvrige indt. | 12.833 | **Uddannelseskonto** | **1.067** |
| Rente | 4.586 | **Arrangementer** | **9.048** |
| | | **EeD** | **8.004** |
| I alt indtægter | **39.394** | **Udgifter** | **31.190** |

**Årets resultat** **8.204**

| *Aktiver* | *Kr.* | *Passiver* | *Kr.* |
|---|---|---|---|
| Obligationer | 85.986 | Egenkapital primo | 149.164 |
| Libroservo | 46.275 | Årets resultat | 8.204 |
| UEA konto | 496 | Egenkapital ultimo | 157.368 |
| Bankindestående DEA | 30.976 | Forudb.kontingent | 6.365 |
| Obligationer Noll | 57.936 | **Noll kapital ult.** | **57.936** |
| | **221.669** | | **221.669** |
| | ====== | | ======= |

I. Schröder

**Ileana Schrøder**
**Formand**

Arne Casper

**Arne Casper**
**Kasserer**

**Regnskabet er gennemgået og fundet i orden, den** 18/3-2014

Tara Gregers

**Tara Gregers**
**Revisor**

Sven Sandø

**Sven Sandø**
**Revisor**

# Gazeteltondaĵoj

06.01.2014 Hjemmet: Krucvortenigmo

04.2014 Metier, la duonjara periodaĵo de la ĵurnalistaj studentoj ĉe RUC: Enkonduka artikolo pri Esperanto kun intervjuoj al Michael kaj Victoria Branebjerg, prof-ino Karen Riisager kaj Mette Hjerting.

08.04.2014 Dagbladet Køge + Ugeavisen "Køge Onsdag": La arta muzeo KØS en Køge metos la feran skulptaĵon TRANSMISSION II de Kim Grønborg sur la havenan placon de la suda haveno ĝis la 14-a de septembro. Ĝi aŭdigos sonregistraĵojn en la dana kaj Esperanta lingvoj – kaj en morso.

14.04.2014 Hjemmet: Krucvortenigmo.

Ekde la venonta numero Grete Nielsen ne plu kolektos gazetajn eltondaĵojn, ĉar ni konsultos Infomedia pli ofte ol la revuo aperas. Koran dankon al Grete pro la laboro dum la pasintaj jaroj.




*Ĉe la unua de majo en Fælledparken kelkaj membroj prizorgis budon.*

# Kopenhagaj okazontaĵoj

Ĉiuj kunvenoj de Konversacia Esperanto-Klubo, Kopenhago, okazas en la Kulturdomo, Tomsgårdsvej 35, 2400 København NV, ekde la 19-a ĝis la 21-a horo. – Prezidanto kaj kontaktulo: Peter Wraae, telefono +45 6070 7969, retpoŝto peter@wraae.dk.

12/5 **Mia Fuena Infanaĝo.** Betty Chatterjee gvidos. – Ni legos la unuan ĉapitron (paĝoj 1 - 22) de Mia Fuena Infanaĝo Carl Nielsen. Se vi ne jam aĉetis la libron, turnu vin al Arne Casper, kiu havas la stokon. La prezo estas 100 kronoj.

19/5 Filippo Botta: **Hungara renkontiĝo.**

26/5 **Kanta vespero.** Gert M. Petersen kaj Bent Jensenius gvidos

2/6 **Novela kvizo.** Ni legas nekonatan novelon surloke. Bent Jensenius gvidos.

4/6 (merkredo!). Ni manĝos kune en Chilimili je la 12.00, H. C. Andersens Boulevard 12, 1553 København V. Poste ne estos programo.

9/6 Ne estos programo pro la pentekosto.

12/6 (ĵaŭdo!). **Ekskurso.** La vojo de Zamenhof. Ludoviko Zamenhof gastis Kopenhagon post la UK en Dresdeno en la jaro 1908. Dank' al la informa artikolo pri la vizito, ni multe scias pri lia vizito, kaj kion la ĉiĉeronoj montris al li kaj la aliaj gastoj. Nu, la 12-an de junio je la 12-a ni renkontiĝu ĉe la informejo de la ĉefstacidomo en Kopenhago, kaj ni sekvos lian vojon. Bonvolu kunporti sandviĉojn, trinkaĵojn, komfortajn ŝuojn kaj ombrelon. Ho jes, nia majstro estis malbonŝanca – pluvis kaj pluvis konstante. Betty Chatterjee gvidos.

16/6 Ana Røsum faros **kvizon**.

Tiam estos somera ferio!

18/8 Ni rakontos pri tio kio okazis dum niaj ferioj. Bonvolu kontribui, kaj kunportu fotojn.

# En dana Esperantujo troviĝas trezoro...

Ĉu tio estas la unua linio de malbona poemo? Ne, mi nur celis trovi la unuan frapan frazon por artikoleto pri nia ŝajne malatentata trezorejo – la libro-servo.

Kie situas tia valora trezorejo? En la hejmo de la prezidantino de Dana Esperanto-Asocio, Ileana Schrøder, kiu malkaŝeme volus malplenigi la trezorujon (t.e. la bretaron). Tio okazos ne senpage, tamen laŭ favoraj prezoj. Kvankam la stoko estas ĉefe malnova, tio ne signifas, ke la varoj estas malfreŝaj – male.

Unu el la juveloj estas la rakontaro, t.e. 'Stokita Vino' de Poul Thorsen eldonita en la jaro 1995.

Poul Thorsen, kiu naskiĝis en la jaro 1915, estis do 80-jara kiam la libro estis eldonita. Ĝi enhavas amason da rakontetoj ne nur pri liaj vivospertoj kaj vojaĝoj sed ankaŭ pri la diversaj travivaĵoj de aliuloj.


La rakonto membiografia "En prizono" temas pri siaj propraj spertoj, kiam li estis studento. Ĝi komenciĝas per la frazo: "Dufoje mi trovis min en prizono". Legante ĝin la tagon post la memorinda prelego de Ulrich Lins en kiu li menciis, ke Poul Thorsen estis kunaŭtoro de la libro "Tra Densa Mallumo", mi tuj volis ekscii kial, li estis malliberigata du fojojn. La akuzoj estis bagatelaj kaj hazardaj, sed la traktadoj, kiujn li suferis, estis malhome krudaj.

Kiel mondvojaĝanto tra 70 landoj Poul Thorsen inkluzivis multajn rakontojn aŭ eseojn pri malsamaj landoj; Kastilio, Balkano, Rio, Ĝibraltaro, Paska Insulo, Mianmaro, Maroko, Delhi kaj Sri-Lanko. Alloge estas, ke li rakontas pri nekutimaĵoj, ekzemple aŭtopaneo en maroka dezerto kaj babilado plennokta kun rikiŝisto en Mandalejo.

En "Ekster ĉiuj normoj" Poul Thorsen ame skribis pri Peter Manniche, kiu estis estro de Internacia Altlernejo en Elsinoro, kie li mem studis en la jaroj 1936 –7. Ili daŭre havis amikajn kontaktojn preskaŭ ĝis Poul Thorsen verkis la rakonton.

Kion travivas juna petveturantino, kiu estas “tre somere vestita”? Poul Thorsen ankaŭ tuŝis tian temon en sia rakonto “Flankvoje”. Tia veturado povus esti danĝera, sed eltrovema junulino scipovas savi sin per nekutima truko.

La libro estas humura, saĝa kaj ĝuinda. La lingvaĵo estas defia sed tre plaĉa. Aĉetu kaj senbedaŭre legu ĝin. Prezo 85 kronoj. 2 aŭ 3 ekzempleroj haveblas en nia Libroservo. Tamen la unua legemulo, kiu kontaktos Ileana aŭ Arne rajtos aĉeti ĝin kontraŭ 75 kronoj.



# Nova Esperanto – dana vortaro



Ĵus aperis **nova Esperanto – dana vortaro.**

Ekde tuj haveblas la granda nova Esperanta-dana vortaro de Preben Valdemar Bagger.

En 2009 Jacob Nordfalk vizitis Preben Bagger kaj skanis la krud-materialon por la vortaro ellaboritan de Preben Bagger. Alina Pokhrel en Nepalo transprenis la taskon entajpi la 800 paĝojn en tekstdosierojn. Ekde 2010 Jacob Nordfalk, Jytte Sunekær kaj Peter Weide kontrolis, korektis kaj ampleksigis la materialon.

La rezulton de tiu laboro en pdf-formato vi povas libere kaj senpage elŝuti ĉe http://javabog.dk/esperanto/dana_vortaro_bagger/vortaro.pdf. Pri la ek-esto de la vortaro vi povos legi iomete fine de la dosiero.

Presita, libroforma eldono estas en preparo. Pro tio la laborgrupo petas, ke oni ne mem printu la dosieron, sed subtenu tiun eldonon per mendo, kiam eblos.

Dankon!

*por la laborgrupo*
*Peter Weide*

# Honorigo al Mogens Rude Andersen

Panteono origine estis templo dediĉita al ĉiuj dioj. Poste oni ligis tiun nomon al memorhalo por elstaraj personecoj de iu lando. Ekzemple la Panteono en Parizo estis konstruita en la lasta duono de la 18-a jarcento, kaj baldaŭ poste konsekrita kiel tombejo/memorhalo de francaj famuloj, ekzemple François Voltaire, Jean-Jacques Rousseau, Victor Hugo kaj Émile Zola.



La ideo starigi interretan Panteonon esperantistan ĉe edukado.net, kies redaktoro estas d-ino Katalin Kováts, realiĝis antaŭ pluraj jaroj. Ĝis hodiaŭ estas registritaj 128 personoj. Komence estis honorigitaj meritplenaj geinstruistoj jam forpasintaj, inter ili jenaj danoj: Lorenz Friis, Mogens Groth, Kirsten kaj Peter Zacho. Sed ekde 2010 ĉiujare la 15-an de decembro edukado.net ankaŭ premie publikigas 10-15 novajn prezentojn de vivaj geinstruistoj. Sur la listo de la Zamenhofa Tago 2013 aperis jena nomo: Mogens Rude Andersen, esperantisto ekde septembro 1953.

Okaze de tiu honorigo mi deziras tutkore gratuli al Mogens Rude Andersen, kiu nun troviĝas en la listo de meritplenaj personoj de la Panteono, ĉar tion li absolute meritas. Li estas tre diligenta, lerta kaj preciza persono, kiu ĉiam estas preta helpi multajn esperantistojn. Efektive li estas unu el la plej kompetentaj esperantistoj en Danio. Laŭ mi la danoj ne sufiĉe utiligas lian talenton. Entute la Esperanto-movado estus en pli bona situacio, se ĝi pli bone scius utiligi la nomojn/personecojn en la sino de la Esperanto-Movado mem, kapablajn lerte informadi la mondon ekster la Esperanto-movado.

Fine, mi deziras ankoraŭfoje tutkore gratuli al Mogens Rude okaze de la elekto.

*Birthe Lapenna*

# Atentu kolektantoj

La ekspozicio "Esperanto kaj kolektado" interesiĝas pri viaj kolektoj.



La 27-an de septembro en 2014 (kadre de tutlanda filetala ekspozicio) okazos ankaŭ inaŭguro de nova tutjara ekspozicio kun la supra temo en la Esperanto-Muzeo Svitavy en Ĉehio. Por ke ĝi estu laŭeble plej kvalita kaj bunta, la organizantoj bonvenigus kunlaboron de Esperanto-kolektantoj!

Ni serĉas interesiĝantojn, kiuj pretus senpage disponigi por unu jaro elekton el siaj kolektoj. Bona pritrakto kaj protekto kontraŭ damaĝo aŭ ŝtelo estos prizorgita. Nomoj (kaj laŭ interkonsento fotoportretoj) de la ekspoziciantoj estos videble menciitaj. ĈEA pretas repagi sendokostojn de la pruntedonantoj kaj siakoste ankaŭ bonorde resendi la materialojn post fino de la ekspozicio.

Ni serĉas ekspoziciaĵojn en la sekvaj kategorioj:

1) "Esperantaĵoj" (prioritate filatelaĵoj: poŝtmarkoj kaj kovertoj, kaj tridimensiaj objektoj (suveniroj kun Esperanto-motivoj, kuriozaĵoj) sed ankaŭ insignoj, glumarkoj, medaloj, kalendaroj ktp (ne tiom bildkartoj, krom historiaj ĝis 1939).

2) "Kion kolektas esperantistoj" – specimenoj el diverstemaj kolektaĵoj pri NEesperantaj temoj: ekz. moneroj kaj bankbiletoj, artaĵoj, popolmetiaj objektoj, folkloraj pupoj, ludiloj ĝenerale ktp.

3) "Kuriozaj suveniroj el eksterlando".

Bonvolu sendi vian ĝeneralan oferton al la jena adreso:
muzeagrupo@esperanto.cz (kun priskribo kaj laŭeble fotoj de la ekspoziciaĵoj). Nur post konkreta interkonsento bv. sendi la elektitajn objektojn. Alikaze ĈEA ne garantias kovron de sendokostoj aŭ ekspoziciigon. Eblas kompreneble ankaŭ persona transdono en Svitavy (aŭ dum Regiona renkontiĝo en Litomyšl). Dankon por via komprenemo, ni antaŭdankas vian intereson, kaj antaŭĝojas pri la kunlaboro!

*[Ret-Info]*

# Jubilea kongreso de EEU

## Rijeka (Kroatio) – 6.-12. julio 2014

La deka jubilea kongreso de EEU diskutos pri la temo "Justa Eŭropo – justa lingva solvo en EU" kion aparte substrekis en sia deklaro la kroata prezidento Ivo Josipović, kiu aŭspicias la kongreson pro tio ke lia prezidenta programo ĉefe enhavis la celon realigi pli justan Kroation. Li diris ankaŭ ke li mem subtenas Esperanton ĉar ĝiaj celoj, paco kaj amikeco, kongruas kun liaj politikaj kaj personaj celoj. Li invitis delegitaron de EEU al aparta akcepto kiun li faros en junio ĉi-jare.



Kroatio estas la plej nova membroŝtato de EU kaj havas verŝajne la plej fortan tradicion de Esperanto inter ĉiuj EU-membroŝtatoj. La jugoslavia eksprezidanto Tito, kroato, parolis Esperanton, kaj aŭspiciis UK-on en Zagrebo en 1953; la kroata ŝtatprezidanto Stjepan Mesić aŭspiciis UK-on en Zagrebo en 2001. En Kroatio esperantistiĝis esperantistaj famuloj kiel

Ivo Lapenna kaj Tibor Sekelj kaj de tie devenas multaj aliaj gravaj agantoj por la internacia Esperanto-movado. De tie devenas la Zagreba Metodo de instruado de Esperanto, proksimume duono de ĉiuj teatraj aktivadoj en Esperanto dum la ĝisnuna historio, kaj granda daŭra informado pri Esperanto al la ĝenerala publiko.

Aliĝu do al escepte interesa kongreso, kontribuu al viglaj diskutoj pri la ĉeftemo pri kiu prelegos ankaŭ neesperantistaj fakuloj kaj superaj politikistoj.

Ne nur ke vi havos la okazon serioze partopreni en grava esperantista kunveno, kies rezultojn sekvos la ĝenerala ĵurnalistaro en Kroatio, sed vi povos ĝui ankaŭ  abundan kulturan programon: ĉiutage vespere okazos koncerto aŭ teatra spektaklo, kaj dumtage estos pluraj ebloj viziti kultur-historiaĵojn en Rijeka inkluzive de nova moderne konstruita moskeo.

Venu do al bela mediteranea regiono, Adriatika marbordo kaj spertu belegan naturon en facile atingebla parto de Eŭropo. Kompreneble en tia bela ĉirkaŭaĵo, en unu el la plej famaj turismaj regionoj de Kroatio, atendas vin ankaŭ pluraj ekskursoj, ĉe-maraj kaj montaraj. La tuttaga ekskurso gvidas vin al ĉarmega ĉirkaŭaĵo de Rijeka, kaj vi povas aliĝi ankaŭ al 4-taga antaŭkongreso.

Informoj pri la kongreso: http://eeu-kongreso.webnode.com/

*Sandra Schweder*

## Turista vojaĝo al Bona Espero

La bieno-lernejon ”Bona Espero” en Brazilo mi vizitis ĉi-vintre. Ĝi situas en altebenaĵo 230 km norde de la ĉefurbo Brasília. La vojaĝo estis organizita de Esperantotur en Bydgoszcz kaj daŭris unu monaton ekde meze de decembro. Mi partoprenis malgrandan grupon de ses personoj, kiun gvidis la UEA-estrarino Barbara Pietrzak. Krom Bonan Esperon ni ankaŭ vizitis la urbegojn Brasília kaj Rio de Janeiro.



*Esperantistoj ĉe gastodomo en Bona Espero*

Bona Espero estis fondita en 1957 de brazilaj esperantistoj kiel sociala institucio por infanoj, kaj ekde 1974 la paro Ursula kaj Giuseppe Grattapaglia estis ĉefaj prizorgantoj. Ili evoluigis Bonan Esperon al moderna lernejo-internulejo, kie multaj infanoj el malbonaj kondiĉoj inkluzive orfojn ricevis edukadon en familia rondo. Sed tiu unikaĵo en la Esperanto-mondo nun estas en fazo de ŝanĝiĝo. La bezono de tiutipa institucio ne estas tiom granda kiel antaŭe pro la evoluo de la brazila socio, kaj ĉi-vintre loĝis tie nur tri infanoj. La brazilaj esperantistoj nun diskutas restrukturigon de Bona Espero por fari el ĝi veran Esperantan Kultur-Centron.



*Vidaĵo el Bona Espero trans la savano al Morro Baleia (Monto Baleno)*

Nia vizito en Bona Espero estis ero de tiu evoluigo. Antaŭe multaj eksterlandanoj vizitis kiel laborantaj volontuloj, sed ni estis la unua vera turista grupo. Ni ĝuis tri-semajnan restadon en tre afabla etoso. Multaj brazilanoj, interalie kelkaj antaŭe tie loĝintaj infanoj, vizitis la bienon dum la kristnaska kaj novjara festoj. Ankaŭ la antaŭa pola televida ĵurnalisto Roman Dobrzyński estis en Bona Espero. Li multfoje vizitis kaj konatigis Bonan Esperon per televidprogramoj kaj libro. Por ni li estis sperta gvidisto kaj instruisto.

Situanta en la brazila savano je alteco de ĉirkaŭ 1200 m la klimato estas milda. Dum nia norda vintro tie estas pluvsezono, kio signifas ke la savano iĝas verda kun multaj floroj kaj birdoj. Ne pluvas la tutan tempon kaj la suno ofte kaj forte brilas. En la ĝardeno maturiĝas mangoj kaj bananoj, sed troviĝas ankaŭ aliaj fruktoj. Bona fonto donas puran akvon, kaj preskaŭ ĉiutage mi naĝis en la akvorezervujo aŭ en proksimaj riveroj. Bona Espero havas propran akvofalon je piedira distanco, kaj en la regiono situas nacia parko kun multaj akvofaloj kaj aliaj vidindaĵoj.



*Akvofalo en Rio Mulungú sur la tereno de Bona Espero*

En Bona Espero troviĝas riĉa kolekto de la Esperanta literaturo. Kiam pluvis mi legis el tiu kolekto, kaj vespere ni ofte rigardis filmojn kun komentoj en la lingvo internacia. Speciala memorindaĵo estis kiam brazila paro, kiuj intencas komenci novan vivon en Bona Espero, invitis nin al ilia nupto en tao-inspirita templo najbara.

Mi esperas ke estos sukcesa la transformiĝo al Kultur-Centro, kie esperantistoj el diversaj mondopartoj povos veni. Mi ja tre ĝuis la restadon en Bona Espero, kaj esperas ke ankaŭ aliaj havos tiun eblecon. La vojaĝo finiĝis per kelktagaj vizitoj en Brasília kaj en Rio de Janeiro gvidataj de spertaj lokaj esperantistoj.



*Flore dekoraciita Zamenhof ĉe Bona Espero*

*Martin Häggström*

# Mallongaj notoj

En Aŭstralio estis lanĉita la 5-an de aprilo ETV – interreta Esperanta Televido je la adreso http://esperantotv.net/. Alklako tie kondukas al http://www.istreamstudios.tv kiu estas gastiga retejo de malgrandaj televidkanaloj. Ĝi do estas multe pli modesta provo ol la siatempa, forvaporiĝinta ITV en Brazilo. Tamen jam estas pluraj spektindaj eroj en ETV, ekzemple "La koko aŭ la ovo?" de la (duone) dana artisto Daniel Salomon.

ISAE nun malfermis en la retejo http://scienca-revuo.info publikan interretan arkivon de Scienca Revuo de la postmilita periodo kun pli ol 2000 artikoloj. La artikoloj estas skanitaj en simpla, senteksta bilda formato, sed la retejo donas eblon pri serĉado laŭ nomo de la aŭtoro kaj titolo de la artikoloj. La skanado de la artikoloj realiĝis danke al la kunlaboro kun Interkultura Centro Herzberg.

La prezidanto de Skota Esperanto-Asocio, Francesco Maurelli, invitas al la 1-a tutkelta Esperanto-kongreso, kiu okazos kadre de la 109a skota Esperanto-kongreso en Pitlochry, Skotlando, ekde la 6a ĝis 11a de junio 2014: "Vi havos la unikan ŝancon partopreni en kongreso kun ambaŭ la plej malalta cifero (ja temas pri la 1a tutkelta kongreso) kaj la plej alta (109a skota kongreso!). La programo estas bunta - distra, kleriga, kaj kapabliga, kaj la mirindeco de Skotlando ravos vin. Nepre partoprenu!"
http://skotlando.org/index.php/panceltic-congress-tutkelta-kongreso

Ole Therkelsen invitas al somera kurso pri Martinus: "La 26an de julio ĝis la 2a de aŭgusto eblos kune kun aliaj esperantistoj studi la analizojn de Martinus. La kurso okazos en la Martinus-Centro de Klint, Klintvej 69, 4500 Nykøbing Sj. ĉemara urbeto kiu situas ĉ 3 horojn for de Kopenhago. Al somera kursosemajno de la centro venas kutime ĉ 200 homoj, ĉefe el la skandinavaj landoj sed dum kelkaj semajnoj estas instruado ankaŭ en la angla, germana, hispana kaj Esperanto. Krom prelegoj, studgrupoj, diskutrondoj kaj ĉemaraj promenadoj eblas bone manĝi kaj amikumi en la vegetara restoracio de la centro. Al la programo de la Esperanto-grupo kontribuos i.a. Jonas Dalmose, Mathias Dalmose, Hokan Lundberg kaj Henning Sato von Rosen. Por pli da informoj kaj prezoj, vidu www.martinus.dk/eo aŭ skribu al esperanto@martinus.dk."

# Konferenco de ILEI

La 47-a Konferenco de ILEI okazos en Montevideo, 19-25 julio 2014. La Leĝa Palaco en Montevideo (Palacio Legislativo, urugvaja parlamentejo) permesis, ke la solena inaŭguro de la 47-a konferenco de ILEI povos okazi en la Palaco lundon antaŭtagmeze, la 21-an de julio 2014. Gratulon al LKK de ILEI pro ĉi tiu grava atingo.



En "Palacio Legislativo" kunsidis la Ĝenerala Asembleo de Unesko en la jaro 1954, kiam ĝi akceptis la unuan rezolucion de Unesko pri Esperanto. ILEI konferencas ĉi-jare en Montevideo omaĝe al la 60-a datreveno de tiu evento. La kulturan gravecon de la konferenco de ILEI oficiale agnoskis la urugvajaj ministerioj pri edukado kaj kulturo kaj pri sporto kaj turismo. Aŭspicias ĝin la Nacia komisiono pri Unesko kaj la ŝtata Universitato de la Respubliko. Interesiĝon kaj emon partopreni en la konferenca simpozio pri la temo *Lingva justeco en praktiko: latinamerikaj spertoj kaj tendencoj* esprimis la regiona oficejo de Unesko en Montevideo, Lingvistika Instituto de la Humanistika Fakultato kaj aliaj neesperantistaj koncernatoj.

Krom la solena inaŭguro, la cetera konferenca programo ĉefe okazos en la Ateneo de Montevideo en la urbocentro, kulturinstitucio aĝa proksimume kiom Esperanto. Je 15-minuta promendistanco troviĝas la hotelo "Los Angeles" kie plejmulto de la konferencanoj loĝos. Tie okazos la unuataga (sabaton, la 19-an de julio) akcepto de konferencanoj kaj la ILEI-tradicia interkona frandvespero.

La lastan konferencan tagon, la 25-an de julio, estos organizita komuna veturo al Bonaero por UK kun dumvoja ekskurso tra la historia urbo Colonia (okcidente de Montevideo): buse ĝis kaj tra Colonia kaj prame ĝis Bonaero. Tuttaga ekskurso dum la ekskursa tago (mardo, la 22-a de julio, mendilo publikigota) gvidos orienten, al Punta del Este – Casa Pueblo – Piriápolis – Estancia Renacimiento – Atlántida kun tagmanĝo en tipe urugvaja Estancia Renacimiento. Aliaj promenaj kaj busaj ekskursoj tra Montevideo mem ebligos konatiĝon kun ĝia kultura kaj arkitektura riĉeco.

Bonvenon!

Por aliĝi: www.ilei.info/konferenco/2014/alighilo2014.doc
Aliĝkondiĉoj: http://www.ilei.info/konferenco/2014/Montevideo2.pdf
Pri la konferenco: http://www.ilei.info/konferenco/2014/Montevideo1.pdf

*Radojica Petrović, Sekretario kaj estrarano pri konferencoj, ILEI*

## Esperanto por abiturienta diplomo

En 2011-2012 la francaj Esperanto-asocioj SAT-Amikaro kaj Espéranto-France kolektis pli ol 33.000 subskribojn al petskribo, ke Esperanto estu akceptata kiel nedeviga fako por abiturienta diplomo.

En Francio fine de la mezlernejo, 18-jaruloj trapasas ekzamenon kun maksimume tri lingvaj fakoj, devigaj kaj nedevigaj. Inter la nedevigaj estas elekteblaj sesdeko da lingvoj, kelkaj por parola ekzameno, sed plimulto por skriba ekzameno. La francaj samideanoj petas, ke Esperanto estu akceptata por skriba ekzameno, t.e. teksto 30-linia en la fremda lingvo, pri kiu la kandidato respondu kvar demandojn, verku kelkajn liniojn de "persona esprimo" kaj traduku al la franca dekon da linioj, entute dum du horoj. La nivelo estas inter B1 kaj B2.

La petskribon subskribis dekoj da deputitoj, multaj famuloj, urbestroj... vidu: http://esperanto-au-bac.fr/. Delegacio kvinpersona: Emmanuel Debanne (kunordiganto de la kampanjo), Guy Cavalier (prezidanto de SAT-Amikaro), Axel Rousseau (prezidanto de Espéranto-France), François Lo Jacomo (akademiano kaj ekzamenanto) kaj Dorian Reale-Caron (16-jara lernanto), oficiale portis la tuton al la ministerio pri edukado la 21-an de marto.



La delegacion akceptis Isabelle Robin, oficejestro pri mezlernejoj, kiu mem ne rajtas decidi tian aldonon de abiturienteca fako, sed raportos pri la 70-minuta diskuto al la decidopova direktoro pri mezlerneja instruado (DGESCO) kaj al la konsilistoj de la ministro.

Isabelle Robin rakontis, ke kelkajn tagojn pli frue ŝi akceptis kurdan delegacion, kiu same petis, ke la kurda lingvo estu akceptata kiel nedeviga fako en abiturienteca ekzameno. Ŝi memorigis, ke 98 % de la lingvo-ekzamenoj koncernas 4 lingvojn, do ĉiuj aliaj estas "maloftaj lingvoj" (inkluzive, ekzemple, la ĉina). Krome tia decido ne estas tiel simpla, ĉar necesas, ke la Ĝenerala Inspektoraro (ministeria instanco, kiu fake respondecas pri la instruado) komisiu respondeculon pri la koncerna lingvo.

Dum la venontaj semajnoj ne atendeblas rapida reago de la decidantoj en la ministerio, unue ĉar ili estas okupataj pri la reformo decidita de la ministro Vincent Peillon, due ĉar la 2-an de aprilo 2014 ŝanĝiĝis la ministro (la nova nomiĝas Benoît Hamon). Tamen la delegacio daŭrigos la agadon, kontaktante homojn kaj en la Ĝenerala Inspektoraro, kaj ĉefe en la Supera Konsilio pri Programoj, ekstera konsilanta instanco, parte faka parte politika, kreita en 2013.

*[www.edukado.net]*



*Supre: Partoprenantoj de la dana jarkunveno antaŭ la kunvenejo.*

*Sube: Esperantistoj sur la Placo de Sankta Petro en Romo, okaze de la Pasko.*

